



Majo

2024

Esperanto-Informilo



Foto: A. Deutsch, 29-a aprilo 2024. „Verda altaĵo apud Haiger-Sechshelden“

Mesaĝo de la prezidanto:

La unua tago de majo estas plezurtago, sed ankaŭ tago por mediti pri nia nuna vivo, por soleni niajn miregajn riĉaĵojn kaj homajn sukcesojn, sed samtempe kontempladi pri ankoraŭ neplemumitaj antaŭkuŝantaj defioj kaj taskoj. Mi ja komencis senfatrasi mian hejmon de aĵoj kaj balasto, kiu kolektiĝis dum la jaroj ekde infaneco. Dume mi retrovis amatajn librojn, sondiskojn kaj ludilojn. Unu el la unuaj sondiskoj kiujn mi aĉetis kaj kiun mi precipe ŝatis pro sia fantazia titolbildo - sed ankaŭ pro sia sorĉanta muziko estis la albumo „La libro de Taliesin“ de la grupo „Deep Purple“, kaj mi tiam estis ege frustita kaj senluziigita, kiam miaj gefamilianoj ne ŝatis aŭ eĉ rifuzis aŭskulti tian muzikon. Pli en mia eseo pri „La libro de Taliesin aŭ la pasinta junuleco“.

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Rakonto
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

Kolofono:

Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto:

**Esperanto-Gesellschaft
Frankfurt am Main e.V.**
www.esperanto-frankfurt.de
Vorsitzender:
Georg Hennemann
Rehgartenstr. 16
35683 Dillenburg
Tel. 02771-8196614

Bankverbindung:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag

ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

“Unua mardo”

la 7-an de majo 24

ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zumo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

“Tria mardo”

surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt

Dienstag, den 21. Mai, 24

Mardon, la 21-an de majo, 24

18:30 h
Sprachrunde

18:30 h
Lingvo Rondo

W. Ullmann

-

-

19:30 h
Vortrag "Brettspiele"

19:30 h
Prelego "Tabulludoj"

S. Bremser

“Kvara mardo”

la 28-an de majo, 24

ekde la 19h horo: Senprograma samideana babila renkontiĝo
Stattcafé, Gremppstraße 21, 60487 Frankfurt/Main





Bildfonto kappaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm


By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745>,

https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg





El la klubo

Anoncoj:

-  18.5.24 12:00pm Informstando en la urbocentro, Biebergasse apud Hirthara-Petrofontano (Struwelpeterbrunnen)
-  25.5.24 13:00pm Somerfesto ĉe Gundhild en Oberusel, ĉiu kunprenu sian
- Ekskurso kun ŝangita dato: 06.7.24**
-  06.7.24 12:00pm Ekskurso al vulkanurbo Gedern kun gvidata vizito de la kastelo Gedern, Renkontejo: Pizzeria „La Roma“, Otto-Müller-Strasse 20, 63688 Gedern, tablo rezervita de 12:00-13:30pm.
-  07.9.24 12:00pm Migrado apud Heidenrod / Kemel kaj kradrorostado
Renkontejo: Kradokabano Kemel (Grillplatz Kemel),
Koordinatojn: Grillplatz Kemer 50°09'39.6"N 8°00'47.4"E
Pluso-Kodo: 5267+97V, 65321 Heidenrod
Ekde 12:00pm migrado aŭ veturado de Kemel al Springen kun vizito de la Rozĝardeno en la Aŝramo Bhakti Marga, Am Geisberg 1, 65321 Heidenrod-Springen, Pluso-Kodo: 4XVV+RG Heidenrod

-  5.8. – 15.9.24 Someraj ferioj de Saalbau-MÜZ

Eventoj en la Rejn-Majn-Regiono:

-  18.05.2024 ESF-Infoŝtando en la urbocentro
-  15.06.2024 ESF-Infoŝtando en la urbocentro
-  20.07.2024 ESF-Infoŝtando en la urbocentro
-  17.08.2024 ESF-Infoŝtando en la urbocentro

ESF-Membraro

Ni kore salutas nian novan membron Ralf Schwarzbach el Majenco kiel aktivan partoprenanton de niaj klubvesperoj, zum-konferencoj kaj babilaj rondoj en la Statt-kafejo. Ni ĝojas pri lia membriĝo kaj esperas fruktodonan kunlaboron.

Libroservo kaj gazetoj

Kiel membro de nia klubo vi rajtas pruntepreni nian librojn kaj periodaĵojn. La libroj povas esti elprenita dum niaj renkontiĝoj en la Saalbau MÜZ per via subskribo kaj devus esti redonita dum la venonta klubvespero. La samo validas por niaj abonitaj gazetoj Monato kaj Beletra Almanako.

La libro de Taliesin aŭ la pasinta junuleco

Opinia eseo de G. Hennemann

Por mi la sondiska albumo „The book of Taliesin” de la rokgrupo “Deep Purple” estis tre grava kaj influhava en mia juneco. Mi rememoras ke mi aŭskultis ĝin ofte kaj ne povis kompreni kial miaj gepatroj aŭ gefratinoj ne partoprenis mian pasion. Malgraŭ la pli aĝa fratino ankaŭ ŝatis ĉi tiun rokgrupon, ne plaĉis al ŝi tiu albumo. Hodiaŭ mi ja komprenas pli bone kial por miaj gepatroj rokmuzikistoj kaj precipe grupo kiel “Profunda Purpuro” kun albumoj kiel la “Libro de Taliesin” ne estis tiom alloga. Unu kialo estis ke en tiu kazo temas pri tre magia aŭ fantasia malnova mondo, kiu estas malkovrita kaj interpretita per tiu muziko. Kiel junulo mi longe rigardis la titolbilon de la albumo kaj aŭskultanta la muzikon forvadis en fabelan mirlandon. La origina libro de Taliesin devenas el Kimrio kaj estas skribita en mallnova kimria lingvo. La dekkvar-jarcenta manuskripto konata kiel *Llyvyr Taliessin* (“La Libro de Taliesin”) estas kaŝa gemo de mezepoka brita poezio. Ĝiaj paĝoj inkludas klasikajn laŭdkantojn al la militantaj reĝoj de frua post-romia Britio, same kiel ekscitigajn poemojn, plenaj de enigmoj kaj brilantaj bildoj, komponitaj en mezepoka Kimrio. Precipe plaĉas al mi la poemo “La Batalo de la Arboj” kie la poeto skribas kvazaŭ li laŭlitere kunhavis la vivon de aĝoj. Mi volas citi du poemfragmentojn el tiu poemo:

I was a harp string,
Enchanted nine years
In water, foaming.
I was tinder in fire,
I was a forest ablaze.
(‘The Battle of the Trees’, ll. 19–23)

Mi estis harpa kordo,
Sorĉitaj naŭ jaroj
En akvo, ŝaŭmante.
Mi estis tindro en fajro,
Mi estis arbaro flamanta.
("La Batalo de la Arboj", ll. 19-23)

...

I was a speckled snake on a hill
I was a viper in a lake,
I was a sickle in Dog-heads’ hands.
I was a hunting lance.
My vestment and chalice,
I prepare them well,
And fourscore clouds of incense
Waft over all.
(ll. 207–14)

...

Mi estis makulita serpento sur monteto
Mi estis vipuro en lago,
Mi estis serpo en la manoj de Hundkapoj.
Mi estis ĉaslanco.
Mia vesto kaj pokalo,
Mi bone preparas ilin,
Kaj okdek nuboj da incenso
flagras super ĉio.
(ll. 207–14)

Kiam mi aŭskultis tiun muzikon mi estis antaŭ la stuparo de adoleskanteco al adolteco, kaj mi, simile kiel la ĉefa figuro *Holden Caulfield* en la famkonata romano “La Kaptisto en la Sekalo” (angle: *The Catcher in the Rye*) rebelis kontraŭ la sensata fremdiĝo kaj supraĵeco en familio kaj socio, enigmon de la homa kondiĉo kaj homa konduko, kion la aŭstrala biologo Jeremy Griffith nun finfine solvis kaj kies natura kaj logika klarigo devus esti lernata en ĉiu lernejo.

Pliaj informoj pri la fonto de tiuj bardaj poemoj troveblas en „La Libro de Taliesin, Poemoj de Militado kaj Laŭdo en Sorĉita Britio”, en kiu la poemoj estas tradukitaj de la kimra al la angla de la aŭtoroteamo *Gwyneth Lewis* and *Rowan Williams*. Laŭ la profesorino pri frua kimra poezio, *Marged Haycock*, la nomo Taliesin estas kombinaĵo de la vorto "tal", kun la signifo "supro" aŭ "gablofino" (kiel en domo aŭ frunto) kun "iesin", kun la signifo "bela", "brilante" aŭ "brilanta" - tial la komuna angla traduko al 'Brilanta Frunto' (angle: 'Shining Brow'. Kial la frunto de la poeto devus esti radianta ne estas klara.) Estas eble legi certajn pasaĝojn kiel implicante, ke la nomo indikas la akvon en kiun la legenda poeto estis ĵetita kiel bebo, rilatante en tiuj kazoj al la brila horizonto de rivero aŭ maro. En ŝia laŭvorta traduko de la poemo

'Taliesin's Sweetnesses' (p. 42), Haycock glosas 'tal' kiel 'mieno'. Tio povus sugesti eĥon de la radianta vizaĝo de Moseo post kiam li vidis Dion. 'Tal' ankaŭ povas signifi 'valoro', kiu povus indiki nomon signifanta ion kiel 'supervaloro' aŭ 'brila ekscelenco'.

La kimra lingvo cetere estas fonetika lingvo, ĉar ĉiu litero estas prononcata. Krom se alie indikite, vortoj estas emfazitaj sur la aŭtaŭlasta silabo, kiel en Taliésin, Carádog, Gwállawg.



Ligiloj:

<https://en.wikipedia.org/wiki/Taliesin>

https://en.wikipedia.org/wiki/Hanes_Taliesin

<http://hdl.handle.net/10107/4654784>

<https://journals.library.wales/view/1277425/1288291/32#?xywh=-1598%2C715%2C6146%2C3079>



Rakonto

Kure al la flughaveno, aŭ: la vivo ekzistas hazarde
Rakonto de Felmano Ulriko

Jam estis la kvina kaj duono. Mi elektis lian telefonnumeron. Atendis...

"Rikardo! Kio..."

"Mia vekilo ne funkciis! Mi nun tuj ekveturos..."

"Bone."

Richard havis la kompanian aŭtomobilon. Li devus esti veninta al mi jam antaŭ kvarona horo. Sed veturi al mi dum komencanta labortrafiko signifas, ke li bezonos pliajn dudek minutojn por veturi al mi, eble pli. Kaj li ja verŝajne nun iom lavas sin, kaj devas vesti sin.

Mi tamen eliris kun mia valizo post dudek minutoj por atendi lin jestrare. Li bezonis tridek kvin minutojn.

"Bonan matenon!"

"Bonan matenon! Pardonu ke mi..."

"Jes. Veturu."

Kaj sekvis rapida veturado de la nordo de Frankfurto al la flughaveno, kiu situas sude de la urbo. Feliĉe mia loĝloko apudas je enirvojo al la aŭtoŝoseo A5, la plej trafikata en Germanujo, kiu okcidente de la urbo iras rekte suden kaj havas tie inter kvar kaj kvin trakojn por ĉiu direkto.

"Ĉu ni atingos la flugon?"

"Ni vidos."

La poŝtelefono de Rikardo sonoris. En la poŝto de Rikardo. Iam finis sonori.

En la flughaveno ni parkis la aŭton en la parkejdomon, kuris de tie al la ĉefa konstruaĵo. Ni ambaŭ sufiĉe sportis, sed la vojo estis ja longa kaj multkoridora, pluŝtupara, la valizoj kun dokumentoj kaj vestoj iĝis pli kaj pli pezaj. Dum ni kuris, mia poŝtelefono sonoris. Kiu nun vokas? Sed mi ne havis la tempon eltrovi. Ni devis rapidi.

"Pordego ses, ĉu?"

"Jes".

Registro de nia bileto, giĉeto...

"La alira pordo jam fermiĝis!"

Ni apenaŭ kapablis spiri.

"Kion nun?"

"Eble mendi sekvan flugon."

La poŝtelefono denove sonoris.

"Jes? ... ĉu! Ni ĵus maltrafis nian flugon..."

Post minuto finis la kontakton.

"Kiu estis?"

"Bernd. Li diris, ke la kliento forŝovis la konferencon ĝis venonta semajno, ĉar grava partoprenontulo malsaniĝis. Ni simple venu al nia oficejo."

Posttagmeze ni sidis en la oficejo de la firmao, vid-al-vide je du kunŝovitaj labortabloj, kaj laboris je niaj komputiloj.

Subite Rikardo kriis.

"Kio?"

"Ĵus en interreto! En Londono, teroristoj bombeksplozidis metroon! Plurdeko da homoj mortis, plurcento vundiĝis. Kaj precize tiun trajnon de tiu linio kiun ni hodiaŭ matene uzintus de la flughaveno al nia celstacio apud la firmao Sungard!"

"Ĉu!"

"Jes. Kaj estas precize tiu metrotrajno, kiun mi notis ke ni prenu por atingi la oficejon de nia kliento ĝustatempe!"

Silento.

"La malsano de tiu unu ulo eble savis nian vivon." li diris.

"Ne. Estis via nefunkciinta vekilo. Ni ja nur sciiĝintus pri la malsaniĝo kiam ni jam estus ekflugintaj. Ni do tamen verŝajne irintus al ilia oficejo por iel antaŭinformiĝi."

"Almenaŭ verŝajne volintus fari tion, jes. Vi pravas."

★ **ESPERANTO - INFORMILO** ★

Esperanto-Gesellschaft
Frankfurt am Main e.V.
Konto-Nr. 1492 54-607
BLZ: 500 100 60
Postbank Frankfurt am Main



1. Vorsitzende
Katarina Eckstädt
Geschw.-Scholl Str 1
63486 Bruchköbel
Tel/Fax: 06181 76343

Bahn-Sozialwerk, Esperantogruppe Frankfurt am Main

Die folgenden Veranstaltungen finden statt im / Sekvaj aranĝoj okazos en

**Saalbau Bockenheim, Schwälmer Str. 28,
Frankfurt am Main, Nähe Westbahnhof**

Einladung zum Klubabend Invito al la klubvespero

4

Liebe Mitglieder, Freunde und Interessenten!

Wir laden zum nächsten Klubabend ein, der am Donnerstag, den **04.05.2000** stattfinden wird.

18.30 h: Sprachrunde: Herr Walter Ullmann: **"Rund um die Sterne"**

19.30 h: Frau Ing. **WANG Yunchen** und Herrn Prof. **SHEN Chengru**, China:

"Chinesische traditionelle Kultur und aktive Wissenschaft"

Frau Ing. **WANG Yunchen** ist Generalsekretärin und Herr Prof. **SHEN Chengru** Vizepräsident der Wissenschaftlich-Technischen Esperanto-Gesellschaft bei der Chinesischen Akademie der Wissenschaften.

Beide sind Mitglieder der Internationalen Akademie San Marino (AIS).

Karaj membroj, geamikoj kaj interesigantoj!

Ni invitas al la venonta klubvespero, kiu okazos ĵaŭdon, la **4-an de majo 2000**.

18.30 h: Lingva rondo: S-ro Walter Ullmann: **"Ĉirkaŭ la steloj"**

19.30 h: S-ino inĝ. **WANG Yunchen** kaj s-ro prof. **SHEN Chengru**,

"Ĉina tradicia kulturo kaj aktiva scienco"

S-ino inĝ. **WANG Yunchen** estas ĝenerala sekretarino kaj s-ro profesoro **SHEN Chengru** estas vicprezidanto de la Scienc-Teknikista Esperanto Asocio ĉe la Ĉina Akademio pri Sciencoj. Ambaŭ estas membroj de AIS.

Karaj membroj, ni ne havas ofte okazon saluti gastojn el malproksima lando Ĉinio kaj aŭdi de ili interesan prelegon. Niaj ĉinaj gastoj sendis al ni longan liston de diversaj temoj, pri kiuj ili povas prelegi. Do, ili estas homoj posedantaj multe da scio, kaj mi estas certa, ni multe gajnos aŭskultante la prelegon kaj diskutante kun ili. Mi esperas, ke multaj de vi venos por ĝui tiun interesan vesperon.

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

La patrino: - Via instruistino ankoraŭfoje telefonis kaj plendis kontraŭ vi.

La filo: - Tio estas malebla. Mi hodiaŭ ne estis en la lernejo.

Proverbo de la monato (de G. Hennemann)

La proverbo, kiujn mi hodiaŭ prezentas, temas pri senpuna libereco

[zam-176] "Bojas hundo sen puno eĉ kontraŭ la suno"

Mi ja diru ke en tiu proverbo la signifo kuŝas en tio ke al hundo permesatas boji sen ricevi punon, ĉar sen la vortoj „sen puno“ la proverbo estus "Bojas hundo eĉ kontraŭ la suno", kio ankaŭ sencodonas, sed iun alian esprimas. Kaj se oni komparas tiun hundon kun homo, kiel ekzemple kun politikisto populista, tiam la proverbo ja fariĝas eĉ pli kredinda.

Fonto: https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_000176.htm

Enigmo (de Felmano Ulriko)

Solvo de la lastnumera enigmo:


- 1.) La nomo de ka serĉita romano estas "Petveturiste tra la Galaksio" (germanlingve "Per Anhalter durch die Galaxis").
- 2.) 1764 estas 42^2 , kaj 42 estas magia nombro en la romano.

Solvis ĝin unu persono :-)

Nova enigmo

Je 23-a de aprilo 1616 mortis Miguel de Cervantes kaj William Shakespeare, je la sama dato, sed ne la sama tago (demando pri tiu enigmo: kial?). Miguel mortis pro diabeto en Madrido, Ŭiljem pro febra infekto en Stratford-sur-Avono. Ambaŭ estas juĝitaj la plej fama verkisto de sia lando, Cervantes (kiu estis soldato) kiel hispanlingva verkisto, fama pro la romano S-ro Kíĥoto, kaj Shakespeare (pri kies unuaj profesiaj jaroj oni nenion scias, iam inter 1585 kaj 1592 li komencis aktori) kiel angla dramisto kaj poeto, konata de la tragedioj Romeo kaj Julieta, Hamleto, Makbeto, teatraĵoj, komedioj kaj sonetoj. Verkoj de ambaŭ aperis esperantigitaj kiel libroj, kaj estas ankaŭ rete legeblaj en Esperanto. Ili naskiĝis 1547 kaj 1564.

La enigma demando do estas: kial aŭ kiel povas esti, ke Miguel de Cervantes kaj William Shakespeare mortis je la sama dato, sed ne je la sama tago?



Skulptaĵo de Miguel de Cervantes (1547–1616), kadre de monumento sur "Placo de Hispanujo" en Madrido.



"Chandos"-portreto de William Shakespeare, farita eble de John Taylor.

La povo de vortoj

Aŭskultu, Lernu, Daŭre Legu - Kantoteksto de Deep Purple

En epokoj pasintaj kiam sorĉoj estis ĵetitaj
En tempo de viroj en ŝtalo
Kie homo estis instruita neniun specialan aferon
Ĉio estis farita per sento
Do listigu,
Do lernu,
Do legu plu
Vi devas turni la paĝon, legu la Libron de Taliesin
Aŭskultu la kanton de aminda Joan
Ŝia sono estas tiel dolĉa kaj klara
En la tribunalejo de la Reĝo
Inter infanoj kaj la kunuloj
Do listigu,
Do lernu,
Do legu plu
Vi devas turni la paĝon, legu la Libron de Taliesin
"Nun aŭdu la vortojn de Taliesyn
Sur la ŝaŭma strando de la oceano
En la tago de mizero
Mi pli utilos al vi
Ol tricent salmoj..."
La leporo li saltas trans la paĝon
Preteraj kasteloj blankaj kaj belaj
Du revantaj ŝakfiguroj sur siaj tabuloj
Kie kamerad-malsaĝulo estas tambureto
Do listigu,
Do lernu,
Do legu plu
Vi devas turni la paĝon, legu la Libron de Taliesin
Do listigu,
Do lernu,
Do legu plu

Vi devas turni la paĝon, legu la Libron de Taliesin
"Trifoje mi naskiĝis
Mi scias tion pro meditado..."
La birdo li flugas la distancon
De paĝoj du ĝis ses
Preter minstreloj en siaj skatoloj
Al la akvoj de la Stikso
Do listigu,
Do lernu,
Do legu plu
Vi devas turni la paĝon, legu la Libron de Taliesin
Ne prenu la bildojn malpeze
Aŭskultu ilian sonon
Pro ilia kolora sento
Sperto estas trovita
Do listigu,
Do lernu,
Do legu plu
Vi devas turni la paĝon, legu la Libron de Taliesin
"Ĉiuj sciencoj de la mondo estas kolektitaj en mia
brusto
Ĉar mi scias, kio estis,
Kio estas nun
Kaj kio okazos poste ... (ekridado)"

Fonto: Musixmatch
Kantverkistoj: Jon Lord / Ritchie Blackmore / Ian
Paice / Rod Evans

Legu kaj aŭskultu plu:

https://en.wikipedia.org/wiki/The_Book_of_Taliesyn#Listen,_Learn,_Read_On

<https://youtu.be/lxbvxhGoTv4>

<http://www.deep-purple.net/lyrics/taliesynlyrics.htm>